



Interveno de
Universala Esperanto-Asocio, [UEA](#)
en la 8a sesio de la
Forumo pri Minoritatoj
Palaco de Nacioj, Ĝenevo, 24-25 novembro 2015

Tagorda punkto 4:
*Malfacilaĵoj de la krimjuraj sistemoj
por kontentigi la bezonojn kaj postulojn de minoritatoj.*

Alparolo de [Stefano Keller](#),
ĉefdelegito de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

Sinjorino Speciala Raportanto, Sinjoro Prezidanto,

Mi nomiĝas *Stefano Keller* kaj kun miaj kolegoj ĉi tie, mi reprezentas *Universalan Esperanto-Asocion (UEA)*, la tutmondan asocion de parolantoj de la internacia lingvo, *Esperanto*. Esperanto estas uzata jam de 128 jaroj¹ tutmonde por interetna komunikado, ebliganta klaran interkompreniĝon, kaj kreante egalecon.

Rilate al la 4-a punkto de la tagordo, nia asocio deziras altiri la atenton pri la fakto, ke lingvo ĉeestas ĉie, en ĉiu aspekto de la krimjuro, ĝi estas je la bazo de la praktikado de ĉiuj rajtoj difinitaj en la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*².

Nia asocio kaj la esperantoparolantoj tutmonde agas subtene al la rajto de ĉiu pri uzo de sia gepatra lingvo en rilato kun oficejoj naciaj aŭ lokaj, samkiel en lernejoj.

Lingva barilo povas malebligi al minoritatoj la adekvatan sinesprimon kaj tiel la defendon aŭ la realigon de sia rajto je justa prijuĝo.

Universala Esperanto-Asocio, en oficialaj rilatoj kun *UN* kaj *Unesko*, defendas la lingvajn rajtojn de minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj. Ni proponas *Esperanton*, la vivantan interetnan lingvon, kiu estas politike neŭtrala kaj facile lernebla komunikilo, efika kaj *vere internacia*.

La temo de la [101-a Universala Kongreso de Esperanto](#)³, okazonta en Nitro, Slovakio, en julio 2016, kun partoprenantoj inter 1'000 kaj 2'000 personoj el 70-80 landoj estos: 'Socia justeco – lingva justeco', traktota en Esperanto.

Rilate al tiu ĉi [Forumo](#)⁴ mi tre dankas la interpretistojn, kies kunlaboro ebligas la komprenon de niaj diskutoj, interalie ankaŭ al forumano surda.

Uzi sian gepatran lingvon en ĉiu situacio de la vivo, estas baza homa rajto, kiel tion precizigas Konvencio de Unesko.


*Unesko estos asociita en 2017 al la celebrado de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (1859-1917), kuracisto kaj lingvisto, iniciatinto de Esperanto*⁵.

Konklude, ni altiras vian atenton al la neceso konsideri la *gravecon de lingvo*, dum la finredaktado de la rekomendoj de tiu ĉi Forumo.

Dankon pro via atento.

Stefano Keller kun Nicole Margot kaj Alain Favre (UEA)

- 1) "125 years of Esperanto" by Rita IZSÁK, UN Independent Expert on minority issues: <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/>
- 2) The Universal Declaration of Human Rights (UDHR) in 463 languages: <http://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/SearchByLang.aspx>
- 3) 101st World Esperanto Congress, Nitra, Slovakia, 23-30 July 2016 <http://www.nitra2016.sk/en/>
- 4) Eighth session of the Forum on Minority Issues on "Minorities in the Criminal Justice System": http://www.ohchr.org/Documents/HRBodies/HRCouncil/MinorityIssues/Session8/A-HRC-FMI-2015-1_en.pdf
- 5) <http://unesdoc.unesco.org/images/0023/002352/235205e.pdf>

Sonregistraĵo de la alparolo (fr):  <http://goo.gl/HJMgsn>